

SUDFRANCIA STELO

Bulteno de la Esperanto-Federacio "LANGUEDOC-ROUSSILLON"

Jarabono : 20 F al Fédération d'Espéranto du Languedoc-Roussillon
CCP 956-28 P Montpellier

1 a Kvaronjaro 1986

n° 96

Unesko firme subtenas Esperanton

La Ĝenerala Konferenco, Konsiderante, ke dum sia sesio de 1954 okazinta en Montevideo, ĝi per sia rezolucio IV.1.4. 4.422-4224 notas la rezultojn atingitajn pere de la internacia lingvo Esperanto sur la kampo de internacia intelekta interŝanĝo kaj de reciproka interkompreniĝo inter la popoloj de la mondo, kaj rekonas, ke tiuj koincidas kun la celoj kaj idealoj de Unesko.

Memorigante, ke Esperanto ekde tiam multe progresis kiel ilo de interkompreniĝo de popoloj kaj kulturoj de diversaj landoj, penetrante en la plimulton de regionoj de la mondo kaj la plej multajn homajn aktivadojn.

Rekonante la grandajn eblecojn, kiujn prezentas Esperanto por la internacia kompreniĝo kaj la komunikado inter la popoloj de malsama nacieco.

Notante la tre grandan kontribuon de la Esperanta movado, kaj precipe de Universala Esperanto-Asocio, en la diskonigo de informoj pri la aktivado de Unesko, samkiel ĝia partopreno en tiu aktivado.

Konscia pri la fakto, ke en 1987 Esperanto festas sian centjariĝon de ekzisto.

1. **Gratulas** la Esperantomovadon je ĝia centjariĝo.

2. **Petas** la Ĝeneralan Direktoron daŭre sekvi kun atento la evoluon de Esperanto kiel ilo por pli bona interkompreniĝo inter popoloj kaj kulturoj.

3. **Invitas** la Ŝtatojn-Membrojn signi la Centjariĝon de Esperanto per konvenaj aranĝoj, deklaroj, eldonoj de specialaj poŝtmarkoj ktp., kaj iniciati la enkondukon de studprogramo pri la lingva problemo kaj Esperanto en siaj lernejoj kaj institutoj de supera lernado.

4. **Rekomendas** al la internaciaj neregistaraj organizaĵoj aliĝi al la festado de la Centjariĝo de Esperanto kaj pristudi la eblecon uzi Esperanton kiel ilon por la diskonigo de ĉiuspecaj informoj inter siaj membroj, inkluzive informojn pri la laboro de Unesko.



Sofia 1985

General Conference
Twenty-third Session

Conférence générale
Vingt-troisième session

大会
第二十三届会议

Генеральная конференция
Двадцать третья сессия

Conférence General
23^e réunion

المؤتمر العام
الدورة الثالثة والعشرون

Résolution XI.4.4.218

Célébration du Centenaire de la création de l'espéranto

La Conférence générale,

Considérant qu'à sa session de 1954, tenue à Montevideo, elle avait, par sa résolution IV.1.4.422-4224, pris note des résultats obtenus au moyen de cette langue internationale qu'est l'espéranto sur le plan des échanges intellectuels internationaux et de la compréhension mutuelle entre les peuples du monde, et reconnu qu'ils allaient dans le sens des objectifs et des idéaux de l'Unesco,

Rappelant que l'espéranto a depuis lors beaucoup progressé en tant qu'instrument de la compréhension mutuelle entre peuples et cultures de pays différents, en pénétrant dans la plupart des régions du monde et la plupart des activités humaines,

Reconnaissant les grandes possibilités qu'offre l'espéranto pour la compréhension internationale et la communication entre peuples de différentes nationalités,

Notant la très importante contribution du mouvement espérantiste, et en particulier de l'Association universelle d'espéranto, à la diffusion d'information sur les activités de l'Unesco, ainsi que sa participation à ces activités,


En égard au fait qu'en 1987 sera célébré le centenaire de la création de l'espéranto,

1. **Présente ses félicitations** au mouvement espérantiste à l'occasion de son centième anniversaire;
2. **Prie** le Directeur général de continuer à suivre avec attention le développement de l'espéranto comme moyen d'améliorer la compréhension entre nations et cultures différentes;
3. **Invite** les Etats membres à marquer le centenaire de l'espéranto par des dispositions appropriées, déclarations, émissions spéciales de timbre-poste et autres, et à promouvoir l'introduction d'un programme d'études sur le problème des langues et sur l'espéranto dans leurs écoles et leurs établissements d'enseignement supérieur;
4. **Recommande** aux organisations internationales non-gouvernementales de s'associer à la célébration du centenaire de l'espéranto et d'étudier la possibilité d'utiliser l'espéranto comme moyen de diffuser parmi leurs membres toutes sortes d'informations, y compris sur les activités de l'Unesco.

REGIONA RENKONTO :

Gi okazos en VAUVERT (30)
la 26an kaj 27an de APRILO

Prelegos Pierre JANTON
Partoprenu !



FEDERACIA KONGRESO EN VAUVERT (30) la 26an kaj 27an de APRILO

Denove ni kongresos en departemento Gard. Ni intencis kongresi iom pli proksime de Montpellier sed diversaj cirkonstancoj faris, ke ni finfine decidis kunveni en tiu agrabla urbeto. La urbestro favoras nin, la salono perfekte konvenas (ankaŭ facile alirebla por personoj sur rulseĝoj); la nura problemo estas, ke pro la kondiĉoj de la hotelestroj, ni preferis elekti loĝejon iom ekstere de la urbo (je 4 aŭ 5 km). Tie ni povos manĝi kune kaj loĝi kun bona komforto kaj normalaj prezoj. Dankon al S-ino Négron, kiu multe helpis por trovi solvon.

Je la dato de la 15a de Marto, ĉio ne estas ankoraŭ definitive fiksata. Tamen la programo estas konata en la grandaj linioj. Ni esperas, ke vi honoros per via ĉeesto nian gaston, S-ron Pierre Janton, el la Universitato de Clermont. La provizora programo estas la jena :

sabaton, la 26an : 15a h : malfermo de la salono (Centre Gourdon), ekspozicio, libroservo. 16,30h. ĝis 18h : agadraportoj. Diskutoj. Ni provos loki programon antaŭ tiu kunveno. Eble S-ro Laval prezentos sian novan libron "Pri la Pensoj de Paskalo". 18,30 ĝis 19,30 : P. Janton prelegos en la franca lingvo (ne hezitu inviti viajn konatojn, se vi loĝas apud Nîmes aŭ Montpellier) pri la temo: "de l'anglais à l'espéranto : le problème des langues internationales" 19,45 h: vespermanĝo en la "familia domo La Manadière" (Le Cailar) 21 h. Distra vespero : la trupo de Béziers prezentos 4 teatraĵojn, inter kiuj la jam faman "Ezoko". Vi ankaŭ vidos lumbildojn, filmon...

dimanĉon, la 27an : 9h : malfermo de la pordoj 9,30 ĝis 10,30 : 1987, JUBILEA JARO - Kion plani? Partoprenos P. Janton 10,30 ĝis 11,00: programero fiksota. 11,00 ĝis 12,00: GEJUNULOJ FARAS DEMANDOJN. Por tiu diskuto, ni kompreneble bezonas viajn junajn gelnantojn sed ankaŭ ne-esperantistajn gejunulojn. Gravus tiu parto de la programo; ne forgesu, ke de la gejunuloj dependas nia estonteco. La junulara delegitino sendis invitojn al la gejunuloj, kies adresojn oni provizis al ŝi. Ankaŭ al tiu programero partoprenos P. Janton; ĉiuj sugestoj kaj proponoj por la programo estos bonvenaj. 12,30 : Komuna tagmanĝo en "La Manadière" Posttagmeze : ekskurso al Aigues-Mortes (aŭ al la vin-muzeo de Gallician, se pluvos)

NI KALKULAS JE VIA PARTOPRENO. NI KALKULAS JE VIA PARTOPRENO. NI KALKULAS JE VI.

Pri nia manĝejo kaj loĝejo "La Manadière". La pensio (sabata vespermanĝo + dupersona ĉambro + matenmanĝo + dimanĉa tagmanĝo) kostas 145 F en kategorio A, 155F en kategorio B, kaj 165 F en kategorio C (kat. B posedas duŝon kaj C necesejon) Atentu, ke ĉiuj ĉambroj estas por du personoj ← Rabato por infanoj ĝis 12 jaroj. Individuaj ĉambroj eblas en la kategorio A sen suplemento, laŭ la disponeblecoj; kun suplemento de 40 F en la aliaj kategorioj. Pluraj ĉambroj estas sur la teretaĝo. Bonvolu plenigi zorgeme kaj resendi plej rapide la ĉi-suban slipon al Jean Hénin -48500 La Canourgue (nia kasistino, S-ino Négron forestos de la 1a ĝis la 15a de Aprilo).



FEDERACIA KONGRESO EN VAUVERT - 26an, 27an de APRILO 1986 - ALIGILO

Nomo, Adreso, telefon-numero :

Mi aliĝas al la kongreso kaj sendas kotizon de 10 F (*senpage por gejunuloj*)
Mi alvenos sabaton, dimanĉon (forstreku) - per aŭtomobilo, per trajno (detalojn pri la trajn-horaroj ni povas komuniki al vi kaj atendi vin ĉe la stacidomo, se necese)

Mi mendas la "pensionon" en kategorio A - B - C en ĉambro kun 2 malgrandaj litoj
en ĉambro kun granda lito

Mi povas loĝi kun aŭ mi deziras individuan ĉambron

→
(daŭrigo sur p. 3a)

MALLONGE :

Vi mem malkovros tiun novan "SFS" kaj ne bezonas klarigojn. Plej gravas la rezolucio sur la frontpaĝo.

Je nia federacia nivelo, ni rendevuas je la 26a kaj 27a de Aprilo en Vauvert kaj bezonas ĉies partoprenon por sukcesigi tiun renkonton. Espereble la veno de P. Janton sufiĉos por konvinki vin kuniĝi.

Lastminuta informo: La unua programero komenciĝos sabaton je 15,45 h. kun S-ro Laval, kiu parolos pri la Esperanta literaturo.

PRAKTIKAJ INFORMOJ :

La kongreso okazos en "Centre Gourdon", kiu troviĝas sur la samnoma avenuo "Avenue Robert Gourdon" (direkto Nîmes).

-Aliĝkotizo de 10 F estas petata de ĉiuj (krom gejunuloj)

-Necesas konfirmi vian aliĝon plej frue (pro la dato de aperigo de la bulteno), ĝirante 50 F, se vi mendas la ĉambrojn kaj manĝojn. Se vi mendas nur la manĝojn, ne antaŭpagu sed anoncu vin ankaŭ frue!

Eblas mendi hotelĉambrojn aliloke (ekzemple en Lunel) se dezirate aŭ tendumi.

-se vi venas per aŭtomobilo: aŭtoŝoseo A9, elirejo "Gallargues"

N 113 : atentu la signon "Aigues-Mortes" kaj post 3 km, veturu maldekstren al Vauvert.

-se vi venas per trajno : La kongresejo troviĝas nur je kelkaj km de la fervojo Nîmes-Montpellier. Jen la trajnoj el Nîmes. La vojaĝo daŭras 15 ĝis 20 mn (ĝis Lunel) : 12,41/ 12,49 (haltas en Vergèze 13,03)/15,02 16,42 h.

Trajnoj el Montpellier : 13,46 (Vergèze 14,09)...

16,34 (Lunel 16,49) , 17,12 (Lunel 17,28); 17,15 (Vergèze 17h45)

Se vi bezonas transporton de aŭ al la trajno, informu J. Hénin 48500 La Canourgue kaj iu atendas vin je la stacidomo (Lunel, Vergèze aŭ se necese Nîmes).

-Pri la dimanĉa ekskurso al Aigues-Mortes, ni trovos kelkajn liberajn ~~sed~~ lokojn en la aŭtomobiloj de tiuj, kiuj venos.

Se leviĝas ne-antaŭvidita problemo, informu nin laŭeble ne tro malfrue. Pri la ĉambroj malmendu, se necese, minimume 24 horojn anticipe .

Ne forgesu, ke dimanĉon okazos (teorie) diskuto kun gejunuloj. Faru vian eblon (speciale se vi loĝas apude, ekzemple en Nîmes aŭ Montpellier) por venigi ilin, eĉ se ili estas nur komencantoj.

NIA KONGRESO DEPENDAS DE VI !

Por sukcesigi nian Jubileon en 87, ni preparu ĝin en Vauvert !
Ĝis la 26a kaj 27a de Aprilo !

J. Hénin

Kaj se urĝas..... telefonu al la numero 66 32 86 36.

Dua parto de la aliĝilo (bonvolu rekopii) -forstreku la nenecesajojn.

Mi ne deziras la "pensionon" sed mendas la sabatan vespermanĝon (45 F)
la dimanĉan tagmanĝon (45 F)

Se vi deziras la "pensionon" bonvolu antaŭpagi 50 F (+ 10F por la aliĝkotizo) entute 60 F X ... personoj = F kun ĉeko al

Fédération d'Espéranto du Languedoc-Roussillon poŝtĉekkonto 956-28 F

Vian aliĝilon kaj ĉekon sendu plej frue al J. Hénin 48500 La Canourgue.

Se vi mendas nur la manĝojn, vi pagos en Vauvert, ne antaŭpagu sed informu jam de nun.

Se vi deziras detalojn, sendu afrankitan koverton.

On demanda un jour à Mme Thatcher quel serait son voeu le plus cher. Elle répondit qu'elle aimerait connaître plusieurs langues de ses partenaires de la communauté européenne. Une indication que les échanges à ce niveau ne sont pas des plus faciles et que les intervenants de haut niveau ne connaissent pas nécessairement l'anglais!

Dans l'"Observer" du 1^o Décembre 1985, le journaliste Brian Moynahan, ayant constaté les difficultés de relations entre "la dame de fer", Mr Mitterrand et Mr Kohl, en raison "des silences embarrassants lors de la conférence de presse" écrivait : "Le grand Trio n'est même pas capable de parler une même langue... la quantité des visites est supérieure à la qualité". No comment ! Ajoutons qu'un tiers des députés des Communes à ce jour ont rejoint le récent groupe de soutien à l'espéranto, et que les espérantistes anglais invitent leurs amis au Congrès Universel de 89 à Brighton.

Which English is the best ? C'était la question posée dans une revue pour professeurs d'anglais. Un article expliqua t que lors d'une conférence internationale à Moscou, où la langue d'échange était l'anglais, les non-anglophones d'origine se plaignaient de ne pas comprendre lorsque les "anglophones" intervenaient... Les échanges se faisaient donc dans un seul sens.

La langue anglaise a de nombreuses variétés. "The Queen's English", celui de la BBC (qui investit d'énormes sommes pour propager l'anglais vers l'étranger... en complément des instituts du "British Council", équivalents de "L'Alliance Française") est celui que l'on apprend mais n'est parlé que dans un certain milieu et dans une région définie. Le parler de Manchester ou celui de Glasgow sont assez différents de lui. Que dire des variétés d'outre-mer, américaine par exemple?

Une autre variante est celle de l'anglais dit "international" parlé par des non-anglophones d'origine et qui a perdu bien des traits d'origine comme l'intonation (alors que l'intonation anglaise est chargée de sous-entendus) ou les syllabes accentuées. Ne s'agit-il pas d'un anglais appauvri?

Il serait trop long d'analyser les raisons historiques, militaires, économiques ou commerciales de la diffusion de l'anglais. La conjonction "Empire britannique" + "puissance américaine croissante" est l'explication principale du remplacement du français par l'anglais comme première langue internationale.

On commence à comprendre les dangers d'une langue dominante qui, comme le latin sous l'empire romain, éteint les autres langues.

Notre langue est déjà atteinte. Un membre de l'Académie Française proposait récemment de créer un impôt pour ceux qui utiliseraient des termes franglais sans nécessité. "Avoir le look" est-il intraduisible en français? ou "être cool". N'est ce là qu'une mode ou est-ce plus grave? N'y-a-t-il pas tendance à vouloir inconsciemment imiter un style venu de l'Ouest qui concerne autant notre habillement que notre nourriture (ketchup, coca-cola et fast food entre autres), nos loisirs... nos programmes télé où "Dallas" est une des "valeurs" ?

J. H.
(à suivre.)

Rondvojaĝe tra sudokcidenta Francio



Dum la 3-a Internacia Esperanto-Semajno (15-22.IX.85) en Sète oni prezentis teatraĵojn de Bukar "Prunto". Sur la foto: Fernande Terral (maldekstre) kaj Suzanne Authier. (Foto L. Marin)

Mi apartenas al tiuj orienteŭropanoj, kiuj bonŝancis viziti Francion ne unufoje. Ĉi-jara propono de Langvedoka Federacio de UFE malfermis la novan eblecon, pri kies sekvoj vi trovos sube koncizan raporton.

Semajno ĉe Mediteraneo en Sète evidentiĝis la enkonduko en la francan esperantistan mondon. Post ties regula laborplena ritmo, sekvis la "saltvojaĝo" ĉiun duan aŭ trian tagon. Tiel ni interkonsentis kun Jean Henin (la admirinde aktiva prezidanto de la Federacio), por ke ambaŭ flankoj de la kontrakto havu sufiĉan kontenton. Sekve: mi vizitis ankoraŭ nekonatan parton de la belega lando, dume, la esperantistoj de la regiono ricevis la gaston, kiu probable neniam aperus alimaniere.

Seminario pri Pedagogio.

UFE organizas tiun seminarion de la 29an de Marto ĝis la 2a de Aprilo en Baugé (Grésillon) por la bonvolemaj instruantoj de E° (ne nur por profesiaj instruistoj). Ĝi estos kaj teoria kaj praktika: samtempe okazos la internacia renkonto de infanoj. En la programo: prelegoj pri didaktiko de fremdaj lingvoj (Prof. Companys-Universitato de Paris VIII), pri aplikado al esperanto (Prof. Szerdahely, Universitato de Budapeŝto), Metodoj de lingvo-instruado (E. Ludwig); diskutrondoj kaj interŝanĝo de spertoj, distra vespero, ktp... Petu detalojn pri la prezoj de J. Henin 48500 La Canourgue.

ANONCETO: Mi kolektas poŝtflamojn pri Langvedoko-Rusiljono. Sendu kovertojn al; C.Gérard 4, Rue Docteur Rives 66000 Perpignan. Anticipan dankon!

S-ro Tybłewski raportis en "Heroldo" (de la 16a de Decembro 1985) pri sia vojaĝo lastan oktobron tra nia federacio kaj la sud-okcidenta regiono. Jen lia raporto. Pardonos la aktorinoj de Béziers, se fotokopio de ne tre bona foto malhelpas al ni rekoni ilin.

Tia vojaĝo, kiu donas eblecon sperti variaĵojn en mallonga tempo, liveras amason da impresoj kaj da neeviteblaj konkludoj. Ĉi-raporte mi eliminos tiujn, kiuj koncernas la landon mem — mirakle riĉan, belegan kaj milfoje priskribitan fare de la plej talentaj verkistoj. Mi travivis fascinojn i.a. pro komparo de Mediteraneo kun Atlantiko (pardonu aŭdacan vi ĉiuj, kiuj saligiĝis dum jaroj en la akvoj). Mi povis kompari orientajn Pireneojn kun la okcidentaj. Dum la tuta vojaĝo okazis io, pro kio mi feliĉis esti tie aŭ ĉi-tie, havante la komunan lingvon kun reprezentantoj de la "indigenoj" (kiel certe skribus la rutinaj raportistoj).

Tamen, mi volas koncentriĝi ĉefe en la aferoj, kiuj koncernas la homojn, kreantajn esperantistajn mediojn en Francio. Unu el la plezuroj estis tio, ke kvankam invitita de UFE, mi oftege troviĝis inter SAT-anoj. Tiu (spite al antaŭjuĝoj) aperterco de la medioj permesis travivi multe pli ol oni ricevas, irante tra rutina, doktrine gardata, vojo. Mi klinu la kapon antaŭ tiuj, kiuj kapablis arigi sin en rimarkebla kvanto kaj en admirinda kvalito! Neforgeseblas tiuj ĝardenaj dialogoj, ludoj, kortuŝoj, malkovroj, kiuj akompanis niajn renkontojn. Mi emfazas pri ĝardenoj pro ĉi-jara escepta vetero, pro la suno, kiu obstine regis en la sud-okcidento.

Kortuŝoj kaj konkludoj ne mankis ankaŭ en fermitaj ĉambroj, salonoj aŭ antaŭ imponaj riĉaĵoj de la materia substanco. Okazis ankaŭ streĉoj, kiam en esperata kontakto kun esperantisto fuŝrolis unudirekta komunikado, sen iu ajn penso pri la dua, kiu devis aŭskulti.

Tiu eco, oftege observata inter la homoj, ŝokas ĉe esperantistoj, kiuj ja ricevas eĉ kontraŭvole pli da informoj pri interpersona kontakto ol la homoj, sen similaj spertoj. La ombreto ne ŝirmu tamen tion, kio ĉefis la malkovroj. Kiam ekzemple la rutina instruisto ekkriis kun surprizego: Ĉu mi instruis vin tiel bone paroli! Jes, sed vi neniam volis aŭskulti, kion mi volis diri! Ĉu eblas ne manĝi tiom, kiam postulas la amikaj mastroj? Eblas, kvankam kun risiko malprezuriĝi ilin. Rifuzi manĝi en francaj domoj, kiuj imponis pro abundeco kaj bongusteco, evidentiĝis por mi la plej malfacila tasko, tial ne ĉiam obstine plenumata. Mi pardonpetas tiujn, al kiuj mi rifuzis; mi dankas al tiuj, kiuj penis, ke mi ne rifuzu.

La fenomeno, kiun mi ne povus imagi sen kelkaj spertoj. Demandita: kion oni plej ofte manĝas en Pollando?, mi honeste kaj kun pedagogia respondeco diradis: *ter-pomojn*. La vorto estis eĉ skribita surtabule kun ciferaj indikoj: 1 kaj 2, por faciligi al la franclingvaj liceanoj, pri kio temas. Mi flamis, kiam neniu rekonis en tio "pomme de terre". Nur postaj dialogoj kun saĝaj francaj amikoj klarigis la ŝokan fenomenon. La slavoj aŭdas pli; tion mi devis travivi, por fari ankoraŭ paŝon strebe al esperantista personeco. Por kompreni, ke ankaŭ en la plej fundamentaj spertoj la individuo estas limigata de siaj eblecoj, kreataj de la loka medio.

Konfirmiĝis la regulo: kie estas persista individuo, tie ekzistas rondo de esperantistoj kapablaj aktivigi; se mankas tia, ekmortas esperantista vivo. Kaj la kvalitoj de la individuo gvidanta difinas la kvalitojn de la grupa laboro. Estis konsole konvinkiĝi, ke inter francaj esperantistoj realiĝas la ideoj de humanisma kunlaboro eĉ inter la homoj, kiujn dividas la ideologio; per tio mi spertis ion nekonatan en mia socia realo (la plej freŝa ekzemplo: onidire la plurismo ne plu eblas en Pola Esperanto-Asocio).

Surtrake mi renkontis spurojn de alia polino, kiun oni gastis samloke iom pli frue: Tamara Roszak montris al la alvenintoj siajn artaĵojn. Mi dankas ankaŭ en ŝia nomo al ĉiuj, kiuj venis kunkrei la etoson, necesan por prelegantoj. Mi rehejmiĝas pli riĉa — kun ĝermo de la deziro reveni.

Tyburcysz Tybłewski



La legantoj skribas⁶...

Vi trovos ĉi-sube tri kontribuojn de niaj legantoj. La unua venas de S-ro Saint-Rome, kiu respondecas pri poreŭropa asocio kaj ĝia bulteno "Le relais de l'Union". Jen traduko de la frontpaĝo de la lasta bulteno:

"La tribuno de la Eŭropanoj : Por komuna lingvo"

"Ni eliros el la ekonomia krizo nur per la Unuiĝo de ĉiuj niaj vivaj fortoj, je la nivelo de Okcidenta Eŭropo. Ni atingos Eŭropan Unuiĝon, nur kiam niaj loĝantaroj povos libere sin renkonti, sin malkovri, sin kompreni de Bresto ĝis Vieno, de Kopenhago ĝis Gibraltaro.

Kiom da fojoj mi ripetis tiuj du frazojn dum tiuj lastaj dudekkvin jaroj.

Centoj da miloj da Eŭropanoj havis la okazon ilin aŭdi, ilin mediti, sub ĉiuj ĉieloj, en ĉiuj lingvoj. Kun ĉiufoje la samaj problemoj : trovendaj interpretistoj, incidentoj de mistradukoj, ktp...

Oficiale, ni apartenas al la sama Kontinento, ni devenas de la samaj radikoj.

Tamen, kiam oni pasas de iu lando en alian, oni kelkfoje havas la impreson de ŝanĝo de planedo, tiom granda estas la nekompreneco inter niaj loĝantaroj, kiuj disponas en la momento pri neniu lingvaj komunikiloj.

Nepre estas antaŭvidenda la adopto de komuna lingvo. Ĉu tio signifas, ke ni devos pro tio rezigni la uzon de niaj naciaj idiomoj? Laŭ nia opinio tio estus tiel grava eraro, kiel la ignorado de la subjekto.

Problemo estas levata, konvenas ĝin respondi sen pasio kaj kun objektiveco.

Ĉar same kiel ŝajnas al ni necese doti Eŭropon per koheraj strukturoj, ni devas doni al ĝi federacian lingvaĵon, kiu sola ebligos forĝi ĝian homogenecon kaj evidentigi ĝian personecon.

Neniu eraru : de la adopto de nia lingvo dependas nia unueco".

Adreso de S-ro Jean Saint-Rome: H56/3, 391 Grand Mail, 34100 Montpellier. Tel 67.75.47.09.

La du sekvantaj leteroj estas reagoj al artikoloj aperintaj en la antaŭaj numeroj. Ŝajnas utile ripeti, ke la artikoloj devas esti laŭeble koncizaj kaj eviti ripeton de jam uzitaj argumentoj. Ni ne volas limigi la kontribuojn sed la spaco en nia bulteno estas limigata ! La unua letero venis de S-ro L. Angevin 30740 Le Cailar:

"En "Sudfrancia stelo" n° 94, en la rubriko: "La legantoj skribas", estas aludate pri mia pledo de Esperanta adresaro. Mi legas tiun frazon : "Je la federacia nivelo tio estas malfacila pro la nombro de esperantistoj" kaj poste : "S-ro Colney el Gap skribis....." Do unue estas komentario por diri, ke je federacia nivelo estas malfacile pro la nombro (ĉu pro tro granda aŭ pro tro malgranda nombro?) kaj due aperas sen komentario la rimarkoj de S-ro Colney, kiu pledas por tutmonda adresaro. Oni ĉefe riproĉis al mi, ke mi volas fari adresaron ne eblan pro la granda nombro kaj pro la grandega laboro kiun ĝi necesus kaj la sola eŝo al mia propono estas prezenti projekton, kiu havas ĉefe tiujn difektojn. Kial estus malfacile je federacia nivelo kun la kunlaboro de la aktivaj esperantistoj kaj eblus je mondnivelo per la laboro de unuopulo?

Mi samopinias kun S-ro Colney, ke "fidinda kaj ĝusta adresaro estas tiel utila sur la praktika grundo kiel vortaro sur la lingva " .



Same kiel pri telefonadresaro, mi proponas, ke oni starigu esperantistan laŭ la departementoj. (Rimarko: kiam oni bezonas telefonadresojn en diversaj punktoj de iu lando, la adresaroj disdividiĝas en plurajn, minimume unu por ĉiu departemento. Tre malofte oni trovas tutlandajn adresarojn en iu loko)

En departementoj Gard kaj Hérault ekzistas Departementaj Federacioj pri Esperanto, alie oni povas starigi sed ne necesas. En Gard estas du grupoj en la urboj Nîmes kaj Alès. Ĉiu grupo starigu adresaron kaj ne estos problemo por la izoluloj.

Ĉu estas vere tro malfacile? Ĉiu grupo agu same en sia loko... kaj por tiu, kiu nepre volus starigi tutmondan adresaron, tio estos facile uzebla kaj bona materialo, ĉu ne?"

Kiam ni prezentis la sugeston de nia amiko L. Angevin, ni rimarkigis ke en iuj landoj (ekzemple Britio) ekzistas tutlanda listo de la Esperantistoj. Same, "Laŭte" eldonas ĉiujare liston de la abonantoj "Sudfrancia stelo" ankaŭ povus aperigi en unu el siaj numeroj la kompletan liston de siaj abonantoj (la nombro neniam estos tro granda...). Departementa listo kun kelkaj nomoj (eĉ kelkdekaj) eble ne estas la plej bona propagandilo por la ekstera publiko. Plie oni ne povas publikigi sen permeso la nomojn kaj adresojn de la koncernataj personoj. Male, kiam temis pri tutmonda adresaro (ĝi ne estas projekto kaj jam aperis unufoje), ĉiu esperantisto estis petigata sendi propravole sian nomon kaj adreson. Tutmonda adresaro, same kiel la "Jarlibro" de UEA restas la plej bonaj propagandiloj por montri, ke E° utilas.

La frontpaĝa artikolo "Pri rasismo" de nia lasta numero vekis intereson. S-ro L. Sauvage (107, Rue Pablo Casals-Bât. A. Les Eygalades - 30000 Nîmes) sendis longan leteron kun komentoj kaj precizigoj:

"... Oni ĉiam forgesas precizigi

1°) ke elmigrinto estas persono, kiu volonte eliras el sia lando por enloĝiĝi en fremdlando kaj intencas adopti la tiean naciecon kaj bonvolas akcepti kaj respekti la tieajn leĝojn. Li estas Franco por la okazo, kiu koncernas nin.

2°) ke la kelktempa laboristo estas persono, kiu eliras el sia lando por labori en fremdlando kun laborkontrakto. Li havas eblecon reiri laŭ peto al sia lando aŭ la fremdlando povas maldungi lin, kiam laborbezonoj ne ekzistas.

Koncerne la Magrebanojn, ili ne deziras elekti alian naciecon. Escepte de la Alĝerianoj, kiuj posedis la francan naciecon antaŭ la sendependiĝo. Mi demandis junajn Alĝerianojn kaj ili respondis al mi, ke ili estas muzulmanoj kaj deĵoros en la alĝera armeo, ne en la franca. Tio estas klara.

Evidente personoj, kiuj ne konas la veran vidmanieron de la araba popolo, povas pensi, ke Araboj povas sin kunligi al nia socio; estas eraro!

Individue Alĝeriano povas esti Eŭropano sed, kiam li troviĝas inter aliaj Araboj aŭ en sia familio, li refariĝas muzulmano antaŭ ĉio. Ofte mi konstatis tion.

Estas grava malsameco inter la eŭropa elmigrinto kaj la araba elmigrinto. La eŭropa elmigrinto sin asimilas pli facile kaj komplete al niaj kutimoj kaj ne estigas ne-kompreneblajn problemojn al niaj respondeculoj.

... Muzulmano pensas kaj diras, ke ĉiuj ne-muzulmanoj estas "malfidelaj hundoj". Mi komprenas la araban lingvon kaj ofte sur la strato aŭdis tiun kvalifikon...."

Fakte la menciata artikolo menciis ke "staras problemo nur pri la afrikaj Magrebanoj kaj muzulmanaj Nigrafricanoj". La fina demando estis, ĉu ni esperantistoj "aspiru al kunfandiĝo de ĉiuj homaj kulturoj, en harmonia tuthomara etoso". Konstati problemon estas simpla afero, trovi taŭgan solvon pli malfacila tasko.

VIVO DE LA GRUPOJ

30 NIMES : La festo de la Tri Reĝoj estis okazo por la loka E° kultura Centro organizi agrablan matineon, sabaton la 18an de Januaro, en la Centro Pablo Neruda. Ĉirkaŭ kvindek samideanoj kaj simpatiantoj partoprenis en ĝi. Filmo pri nia regiono kun komentarioj en Esperanto, skeĉoj en kiuj aktoris junaj knabinoj kaj plenkreskuloj, rakontoj, poemoj, ludoj...distris la ĉees-tantojn, kiuj poste kuniĝis ĉirkaŭ grandaj tabloj por regali sin per bon-gustaj kukoj

Federacio Gard: Ni deziras bonvenon en nia departemento al nia samideano Gilbert ANGEVIN, el la Pariza regiono, kiu de nun loĝas en Aubais.

* *Nia samideano Roger PORRE, lernanto de S-ino Soulier, anoncis al nian edziĝon kun Jeannine DRES. La ceremonio okazos en Milhaud (Gard), sabaton la 29an de Marto.*

Ni gratulas la estontajn geedzojn kaj deziras al ili FELICON kaj PROSPERON.

34 BEZIERS : La grupo aktivas por la preparado de la federacia kongreso, kie ĝi prezentos kvar teatraĵojn kaj la staĝo en Cassan. En Marto vizitis la grupon S-ro Yashovardhan el Hindio. Pri la staĝo de Cassan, jam estas anoncataj kultura vespero (vendredon, la 9an de Majo) kun prelegoj pri geologio kaj senpezeco kaj distra vespero (sabaton, la 10an) kun teatraĵoj, poemoj, kantoj.... En la kurso por komencantoj, kiun gvidos J-P. Peray, oni uzos la libreton "Gerda malaperis". La progresintoj uzos "Paŝoj al plena posedo".

MAURIN : Nova lernantino de la kurso de S-ro Céliqua estas studentino en Senegalio. Eble ni vidos ŝin en Vauvert aŭ Cassan.

MONTPELLIER: La 30an de decembro, ĉe la loka radiostacio "Radio Maguelone" estis intervjuitaj tri esperantistoj el nia grupo dum 45 minutoj. Kvankam la "reagoj" de aŭskultantoj estis vere maloftaj, ni tamen povas esperi, ke multaj homoj iom eksciis pri nia lingvo kaj la movado. Ni ankaŭ havis la eblecon emfazi pri la akriĝo de la lingva problemo en la nuna mondo. Lastan jaron, du samaj elsendoj jam okazis en Montpellier pere de Radio Clapas kaj Radio Agora.

La 8an de Januaro la grupo kunvenis por la reĝkuka festo. Agrabla etoso. Ni akceptis S-ron Martinez, kiu venis el Barcelono por serĉi tradukajn laborojn en Montpellier.

La 29an de Januaro la urbestro invitis la membrojn de la Universitato de la Tria Tempo al danc-posttagmezo kun reĝkuko. Tre bona etoso.

La 5an de Februaro Ges. Diez raportis pri sia vojaĝo en Turkio kun belaj diapozitivaj. La sidejo de nia societo devas ŝanĝiĝi. La direktoro de "Maison pour tous J. Ricôme" akceptas nian asocion. Ni kolektis monon por aboni esperantan grupon el Togo al la revuo "Monato".

Gratulojn pro tiu lasta iniciato. La lumbildojn de Ges. Diez ni revidos en Vauvert.

48 LA CANOURGUE : S-ro Yashovardhan vizitis nin (poste li iris al Béziers kaj Perpignan). Tiu juna kaj simpata esperantisto, el norda Hindio, prelegis entute ses fojojn, al la koleĝianoj de La Canourgue, kiuj faris multajn demandojn, al kelkaj liceanoj en Mende kaj fine al kvindek da personoj. Ekspozicio pri Hindio estis havebla je la samaj datoj kaj ni esperas aperigi artikolon en la loka gazeto.

66 PERPIGNAN: Ne venis multaj informoj sed nova numero de "La Tramontano" pretiĝas. Kiel kutime, pluraj kronikoj de J. Amouroux aperis en filateliaz revuoj.

11 QUILLAN: Nia ĉiam sindonema amiko P. Régner respondecas pri kurso ĉiun sabaton je la 14a h. ĉe Radio Ballade (101,8 Mhz). Se vi loĝas apude, provu ĝin kapti !

SEMAJN-FINA ESPERANTO LINGVO-STAĜO (de la 8a ĝis la 11a de Majo 1986)

Por detaloj vidu la antaŭan bultenon aŭ petu ilin de:

Cercle Biterrois d'esperanto 9, Rue Georges Picot 34500 Béziers.

Vi povas ankaŭ telefoni al 67-31-13-18 aŭ 67-31-13-46 aŭ 67-38-03-52.

Tom da historio pri nia staĝejo:

La plej malnova dokumento pri Cassan datiĝas de la 12a de Marto 1080. Ĝi estas la fondaĵoĉarto de la Ordeno de Sankta Aŭgusteno. La preĝejo verŝajne jam ekzistis en 1080, sed probable estis rekonstruata en tiu tempo je la iniciato de Sankta Guiraud, kiu poste iĝis episkopo de Béziers. Sankta Guiraud pliriĉigis la monaĥojn dank'al impostoj (nenio nova !) kaj aĉetante multajn relikvojn, kapablaj instigi la tiamajn riĉulojn elekti tie sian sepultejon per malavara testamentaĵo. Tiel, estas enterigitaj malantaŭ la preĝejo Roĝero kaj Rajmondo Trencavel (grafoj de Béziers kaj Carcassonne), Raynard de Béziers, ktp, ktp. Sankta Guiraud fondis ankaŭ hospitalon por vojaĝantoj. Ĝi situis en la turo kaj la suda konstruaĵo, kie, nun, troviĝas la manĝejo kaj kelkaj ĉambroj. La monaĥejo estis fama pro sia spirita kvalito kaj la monaĥoj pligrandigis la riĉecon malprofite al la najbaraj vilaĝoj.

De 1272 kaj dum 500 jaroj, la monaĥejo havis proceson kontraŭ la loĝantoj de Roujan. Kial? Kompreneble pro la tre diversaj impostoj. Finfine la vilaĝanoj gajnis en 1737. En la sama epoko, la enloĝantoj de Gabian pli rapidemaj venis disrabi la monaĥojn kaj forpeli la religiulojn; estis la komenco de dekadenco.

Poste la episkopo de Narbonne, kun la helpo de la princo de Conti de Pèzenas, anstataŭigis la monaĥojn de Sankta Aŭgusteno per tiuj de Sankta Genoveva de Parizo. Inter 1754 kaj 1758 la lasta estro de tiu ordeno konstruigis la kastelon verŝajne sur la loko de la monaĥejo kaj renovigis la preĝejon. La kastelo estas bone konservita same kiel la ĝardenoj, balkonoj, feraĵaro. Male, la mebloj, artaĵoj, skulptaĵoj, libroj (10 000) estis rabitaj. Kelkaj libroj savitaj estas nun en la Béziers-a biblioteko. Revolucitempe, Cassan estis vendata kaj aĉetata de la princo Conti. Komence de tiu jarcento, la kastelo entenis vinproduktan bienon, kaj la kapelo fariĝis la kelo ! La emanaĵoj de la vino multe malpurigis ĝin kaj la spuroj estas ankoraŭ tre videblaj. Poste la ŝtato akiris la bienon. En 1953 ĝi estis registrita kiel "historia monumento".

Kaj nun? Cassan estas centro de junaj laboristoj kaj de profesia instruado precipe por la transmaraj laboristoj. Samtempe ĝi estas malfermita al spektakloj, ekspozicioj, staĝoj, renkontiĝoj, kondiĉe ke la asocioj celas kulturen agadon. Ĉu tio taŭgas por ni? Verŝajne jes, ĉar, senhezite, oni konsentis pri nia staĝo.

Kiel atingi Cassan?

De Montpellier: Per privata aŭtomobilo

Veturu ĝis Pèzenas. Tie uzu la D 13, direkto Bédarieux.

Cassan troviĝas sur tiu vojo, je 1,5km post Roujan, maldekstre.

De Bédarieux: unue la D 909 ĝis "Bel Air" (je 8 km de Bédarieux kaj Hérépien)

Tie uzu la D 13 tra Faugères, Gabian. Cassan je 1 km dekstre post Gabian.

De Béziers: unue direkto Bédarieux per D 909. Je 6 km, uzu la D 15 direkto Roujan (atentu : ne konfuzu kun Boujan, kiu troviĝas je la unua vojkruciĝo post Béziers). Ĉe la enirejo de Roujan, vi trovos "Stop". Haltu kaj iru maldekstren (direkto Gabian, Bédarieux) D 13. Je 1,5km maldekstre vi vidos la kastelon.

Per trajno

En Béziers, trajno je 8h48. Alveno en Magalas 9h03. (aŭ 12h20---12h36/17h02---17h17/ 19h14---19h30)


➔ Se vi elektos tiun rimedon, avertu por ke oni atendu vin en Magalas (je 8km de Cassan).

BONAN
VOJAGON !


★ ★ ★

GIS BALDAŬ !

La prezo por la tuta staĝo estas 360 F (kompleta pensio). Al tiu sumo aldoniĝas aliĝ-kotizo de 20F. Aliĝu kiel eble plej baldaŭ, pagante 60 F (aliĝkotizo 20 F + antaŭpago 40F). Vi povas ankaŭ partopreni nur parton de la staĝo (manĝo 30 F, matenmanĝo 10F). Por gejunuloj, la aliĝo estas senpaga kaj la federacio repagos la tendum-kostojn ...



Letero el Nimo (4)



LA POLITIKO KAJ NI

En la antaŭa Nacia Asembleo (*), la grupo de socialistaj deputitoj prezentis sinsekve du leĝproponojn por la enkonduko de esperanto en la duagradajn lernejojn kiel nedeviga instruado. Tiujn proponojn subskribis ĉiuj membroj de la grupo, inter ili S-roj Mitterrand, Savary kaj Chevènement. Depost 1981 la du lastaj fariĝis sinsekve ministro pri nacia edukado. Ili rifuzis efektiviĝi la proponon, kaj prezidento Mitterrand, tiel potenca, ne instigis ilin rememori pri ĝi.

Ni povas rigardi la aferon kiel definitive entombigita. Ĉar se la socialistoj konservus la majoritaton, ne estus motivo, ke ili ŝanĝu sian sintenon; kaj se ili refariĝos minoritataj, ili ne povus dece prezenti trian leĝproponon tiucelan.

Mi ofte diris, ke ni devas nenion atendi de parlamentanoj, registoj kaj ĉiaj politikistoj. Tamen ĉi-foje (en 1981) mi konfesas, ke al mi venis granda espero. Kiel al la plimulto el la francaj esperantistoj. Nun ni estas inter la spititoj kaj senrevigitoj de socialismo - sendepende de niaj personaj politikaj opinioj.

Unu el niaj nimaj samideaninoj ŝkribis al S-ro Jack Lang, ministro pri kulturo. Tiu-ĉi respondis ĝentile kaj afable. Li deziras sukceson al nia propagando, ĉar nia afero estas tre interesa, sed la demando pri la lernejoj programoj koncernas lian kolegon ministron pri edukado (**). Almenaŭ li, ministro pri kulturo, ne deklaras, kiel S-ro Savary, ke "esperanto ne estas kulturlingvo", sed lia favora takso pri ĝi restas platona. Dume, S-ro Chevènement, anstataŭ celi al nova sento internacia, kulturas la malnovan naciisman senton, kaj dekretas, ke la francaj infanoj kantos la Marseljezon en siaj lernejoj.

Tiaj estas la politikistoj el ĉiuj partioj. Ĉu do malesperi? Sendube, pozitiva apogo de la oficialaj instancoj povus esti tre efika, sed ni ne iluziiĝu. Neniam ni ricevos ĝin, tiel longe, kiel ni ne estos pli fortaj per niaj propraj rimedoj (***). Tiu senĥimera konstato signas al ni la irendan vojon: senlace, obstine daŭrigi nian malrapidan por- kaj peresperantan agadon. Kion opinias niaj legantoj? (****)

V A L O .

Notoj de la redakcio: vidu sur la paĝo 11a. →

VOJAĜO

En la lasta numero S-ro Diez raportis pri sia vojaĝo tra Turkio. Tiun-ĉi fojon S-ino Maurin vojaĝigas nin al alia belega parto de Azio : Srilanko...

"Antaŭ nelonge mi vizitis la malproksiman insulon Srilankon, sudoriente de Hindio. Ĉar la fekunda grundo tie ofte permesas tri riz-rikoltojn jare kaj la montara teo havas mondan reputacion, la homoj sukcesas sin nutri sufiĉe kaj sin vesti pure kaj korekte.

Dank'al S-ro Hénin, mi ricevis de S-ro Keller en La Chaux de Fonds kelkajn adresojn de srilankaj esperantistoj el la regiono de Kolombo kaj eĉ du telefon-numerojn. Do tuj kiam ni alvenis post la alteriĝo al nia unua hotelo proksime de la flughaveno, mi telefonis al S-ro Jesudasam (prononcu laŭ la esperanta maniero), la respondeca gvidanto de la Esperanto-Centro srilanka. Li promesis veni almi la morgaŭon, ĉar en organizita vojaĝo neblas forlasi la grupon por renkonti konatulojn aŭ viziti sola ion ajn.

S-ro Jesudasam veturis aŭtobuse kvardek kilometrojn kaj retrovis min je tagmezo en la hotelo tuj post la tagmanĝo. Imagu la plezuron renkonti en tiel malproksima malgranda lando samideanon kaj interbabili tute libere en nia lingvo. Ĉar ĝis nun en miaj eksterlandaj organizitaj vojaĝoj mi ne povis renkonti esperantiston, la plezuro estis pli rara. Ni do povis interparoli duonhoron kaj iom pli en nia propra aŭtobuso en kiu S-ro J. revenis kun ni al Kolombo, akceptita de nia simpatia gvidisto.

Tiu sindonema esperantisto gvidas kurson en Kolombo kun 5-6 gelernantoj de malsamaj niveloj kaj 15-20 personoj, inkluzive la komencantojn, formas la esperantan grupon; ĉar li estas Tamulo, antaŭ tri jaroj dum la lukto inter la du etnoj, la Cingaloj forbruligis la domon kaj aŭtomobilon de S-ro J. kaj kompreneble li perdis ankaŭ siajn esperantajn librojn. Malgraŭ tiu por li katastrofo (li havas familion de sep personoj) li daŭrigis same fervore sin dediĉi al la esperanta afero. Tio, kio plej mankas al la grupo estas la lern- kaj leg-materialo. Ĝi estas ne-trovebla en Srilanko kaj la vivnivelo por ili ege malsuperas la nian kaj ili ne povas mendi eksterlanden.

Mi estis feliĉa, ke mi povis donaci al li malnovan Plenan vortaron kaj kelkajn legolibrojn, sed vere tiom malmulte ! La lernolibrojn ili bezonus en angla eldono, ĉar la anglan ili lernas en la lernejoj.

Ĉar estis lundo, ĉiuj aliaj esperantistoj laboris kaj mi ne sukcesis viziti la Esperanto-Centron nek la bibliotekon, kie deĵoras esperantistino. Ege bedaŭrinde ! Ankaŭ mi bedaŭras, ke antaŭ nia forflugo al Parizo mi ne povis revidi S-ron Jesudasam, kiu tamen venis, sed eraris pri la hotelo ĉar lia telefono malbone funkciis kaj li mise komprenis min. Malfacile ankaŭ estas telefoni el la tieaj hoteloj : la telefonaparato restas ŝlosita, necesas trovi la respondeculon kaj tiu bezonas longan tempon por havigi la korespondanton. Ĉe la alia telefon-numero, kiun mi posedis, neniu respondis.

Sed mi tamen kun plezuro konstatis, ke esperanto progresas kaj havas fervorajn adeptojn en tiaj malgrandaj kaj simpatiaj landoj de la tiel nomata tria mondo.

Al tiuj, kiuj povus kaj dezirus viziti tiun tre belan insulon Srilankon kun ĝiaj afablaj kaj ridetemaj homoj, mi povus doni kelkajn informojn kaj adresojn de tieaj esperantistoj.

M. Maurin
L'Empéry 48100 Marvejols

Letero el Nimo : notoj -

* La "letero" estis skribata en Decembro 85 kaj tajpata la...16an de Marto, do temas pri la Nacia Asembleo antaŭ 1981.

** Kiam aperos la bulteno, verŝajne S-roj Chevènement kaj Lang ne plu estos ministroj. Ni ankaŭ skribis al S-ro Chevènement plurfoje, lastan fojon en Februaro 86, je la iniciato de UFE.

*** Pri niaj propraj rimedoj, relegu la "letero"-n trian en la n° 92.

**** Demando-signo troviĝas je la fino de la "letero". Kion vi konkludas el la malsukceso de niaj klopodoj kaj kion vi sugestas ?

DISTRA PAĜO



Krucvortoj de René Raynaud : (R = Radiko)

Horizontale: I Malsanulo inklina al depremiĝo.

II Tiel senduba ke ĝi ne bezonas pruvon. Landdesegno (R)

III Muzikinstrumento - Infekta malsano aŭ furioza ekscitiĝo

IV Sufikso de pasiva participo - Meti viandon aŭ fiŝon en salon - En Pikardio.

V Serio da nomoj apartenantaj al unu sama kategorio (R) - Franca rivero (R) - Por kuŝi kun li, liaj filinoj ebrigiis lin (R). VI. Bleki kiel kato (R).

Inverse : sufikso por parte entenanto. VII. Kie ĝi estas, muŝoj ne mankas (R).

Trinkaĵo. Prepozicio signifanta akompanon. VIII Sovaĝa porko - Nombro - Havigi al iu tion, kion oni posedas. IX. Rifuzo, malkonsenta - Malofta (R) - Verba finaĵo.

X Dublinano (R). XI Senkapigita malnova franca ormonero (R). Reĝlando etendi-

-ĝanta ĉiuflanke de Pireneoj. XII La du konsonantoj de meblo aŭ de longa, mallarĝa kaj maldika peco da ligno. Poemoj pri paŝtistoj.

	1	2	3	4	5	6	7	8	9	10	11	12
I												
II												
III												
IV												
V												
VI												
VII												
VIII												
IX												
X												
XI												
XII												

Vertikale: 1 Frenezulo pri memekzalto kaj

ĉiograndiĝo (R) - 2 Peni ne renkonti, ne fari.

Mustarda gazo (R). 3 Meblo (R) - Gemo kies koloro varias de la bluo al la herboverdo (R).

4 Kunigilo inter du malsamdiametraj tuboj.

Inverse : serpento (R). 5 Helena mardio (R)-

Inverse : por kolekti voĉdonilojn. 6 Bato (en bokso)

7 Sufikso de pasiva participo - Pronomo - ŝirmilo

kontraŭ ardo de fajro. 8 Ĝi entenas la gloton

kaj la voĉkordojn - Inverse : rilata al ŝafharo.

9 Flosi laŭ la puŝo de la fluo. 10 En figura

senco : la centra punkto de io - Inverse : kavtiga

planto (R). 11 Nefakulo - Nombro - Komenco de

romantikismo. 12 : Gambetta kaj Jules Ferry estis

adeptoj de tiu politika sistemo.

SOLVO DE LA NUMERO 95 : Horizontale : I Kastanjetoj II Akcident' - Tag' III Iri-Naiva

IV Manuskriptoj V Est' - ol - oro VI Ignor' - ok VII Iel - Arenoj VIII Naiv' - Oder' - al

IX As - infanaĵo X Tapiok' - orb XI Moru' - Rtap - Te' XII Kriminalaj.

Vertikale : 1 Karmezina - mi 2 Ak- As' - easto 3 Scintili- Ark' 4 Tiru-Vipur'

5 Adisona - ni - 6 Ne - Kloroform' 7 Jn - Redakti 8 Etnio - Nen - an 9 Apriora-pa

10 Otito- ĵo 11 Javo - aorta 12 Gajakol' - Bej' .

solvo de la liter-enigmo: 1 Citrono 2 Persiko 3 Migdalo 4 Kaŝtano 5 Daktilo

6 Vinbero 7 Mirtelo 8 Cidonio

MIKSITAJ PROVERBOJ : Bone ordigante la ĉi-subajn vortojn, vi trovos tri sesvortajn

proverbojn: kio-kio-kio- ne-ni-ĉiu-ĉio-pri-bone-tion-estas-estas-ploras-lernita-

doloras-elektas-perdita-aspektas.

Miksitaĵ silaboj: Ordigu la silabojn por fari frazon. La solvo estas konsilo:

vi-vi-ri-ĝi-a-fa-pa-ra-de-dek-du-se-es-an-an-fran-ne-non-nur-bo-bon-vo-ko-koj-

lu-pi - gis-raŭ-tas.

La venonta numero aperos fine de Junio, bonvolu sendi viajn kontribuojn plej malfrue la 7an de Junio al Jean Hénin -Route de Montcayroux -48500 La Canourgue aŭ telefonu al la n° 66-32-86-36.

NE FORGESU NIAJN PRINTEPAJN RENDEVUOJN : LA 26an kaj 27an de APRILO en VAUVERT

de la 8a ĝis la 11a de MAJO en CASSAN.

